

Ludwig Uhland,
La kapelo

tradukita de Manfred Retzlaff

Supre staras la kapelo
Sur la pinto de la mont',
La paŝtist' en suna helo
Ĝoje kantas ĉe la font'.

Triste la sonorileto
De funebro sonas de
La altaĵ' tra la kvieto,
La paŝtist' jam kantas ne.

Ĝin ne povas aŭdi soni
La gajuloj post viv-fin'.
Ho, paŝtisto, iam oni
Portos supren ankaŭ vin.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 - †1862-13-11) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-639-1287 (2012-11-02 08:49:45)

Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland.

Ludwig Uhland,
La kapelo

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Supre staras sur la monto
La silenta kapeleto,
En la valo, ĉe la fonto
Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado
Nun eksonas tra l' silento, -
Haltas knabo en kantado
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto
El la valo ĉiu venos.
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,
Oni iam tien prenos.

*Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 - †1862-13-11) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-639-1288 (2012-11-02 16:27:28)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas ankaŭ en www.literaturo.dk/kapelo.htm, ene de la listo <http://www.literaturo.dk/enhavo.htm>.